TEA-BULTENO

25ª JARO - N° 161 JANUARO-FEBRUARO N.1-2/2022

Ni vivas en socio; ekzistas do nenia vera bono por ni, se ne tio kio faras la bonon de la socio.
Voltaire, kaŝnomo de François-Marie Arouet, filozofo, verkisto, poeto (1694-1778)

Bonan Novan Jaron!

Kaj bonan datrevenon al TEA-Bulteno: 25 jarojn de apero!

Karaj TEA-membroj kaj karaj Gelegantoj!

La 2022ª jaro faris siajn unuajn paŝojn en ankoraŭ malcertan situacion tutmondan: ni kiel eble plej serene klopodu alfronti la venontajn tempojn, armitaj per taŭga dozo da kuraĝo kaj multe da realigendaj esperoj.

Ĉi-foje mi metas flanken ĉiajn problemojn, kiuj premas kaj deprimas nin ĉiujn, kaj rigardas al la estonteco kun firma intenco superi la malfacilaĵojn cele al ĉies bono: fido, amo, paco, pacienco akompanu nin, ĉiumomente, konscie kaj konscience, ĉar nur per komuna strebado ni atingos la finon de la malluma tunelo.

Antaŭ kelkaj semajnoj mi legis la sekvan penson, sur kiu mi longe meditis.

Ĝi apartenas al Voltaire: "Mi ne konsentas kun tio, kion vi diras, sed mi ĝismorte batalos por via rajto diri tion." Simpla frazo, sed signifoplena, precipe nuntempe, ĉu ne?

Eble, aŭ pli bone espereble, vi rimarkis, ke la novembra-decembra TEA-Bulteno ne atingis vian poŝtokeston aŭ vian mesaĝujon. Pluraj estas la kaŭzoj de ĝia manko, pri kiuj ne indas paroli. Mia peto al la ĵus komenciĝinta nova jaro estas, ke tiuj motivoj foriĝu aŭ almenaŭ mildiĝu kaj ke la aperritmo de la informilo ne plu ekhavu interrompojn.

Ĝia nuna enhavo prezentas du belajn spertojn en Esperantujo, skribitaj de du geamikoj, unu el Slovakio kaj la alia el Hungario, spertojn kiujn ili ĝuis en pasintaj jaroj aŭ eĉ lastatempe, kaj kiuj espereble ne mankos en la 2022ª jaro, kaj ne virtuale, sed nepre ĉeeste. Tio ĉi estas mia plej sincera deziro adresita al la tuta esperantistaro.

Brilu ĉiam antaŭ ni la bela esperanta stelo!

Via Redaktanto



Grafiko de Brazilaj Verduloj (LBV)



Ni tostu al la Nova Jaro per la Koktelo Esperanto!

Ne ĉiuj scias, ke TEA-ano Pino partoprenis en pluraj konkursoj pri koktelo-inventoj, gajnante prestiĝajn premiojn. Sekve la prezidanto petis lin krei verdan likvaĵon, nomotan Esperanto.

La rezulto estis ege bongusta trinkaĵo, kiun ni gustumis dum klubaj vesperoj kaj okaze de festindaj datrevenoj.

Jen por vi la recepto:

5/10 Verda Kuraçao
3/10 Bakardi-rumo
2/10 Gordon-ĝino
Muelita glacio.

Enmetu la glacion en skuilon kaj aldonu la alkoholaĵojn. Skuu kelksekunde kaj versu en larĝajn glasojn.

Dekoraciu per aktinidia eltranĉaĵo kaj ... Sanon!

SES – lernejo kaj amuzejo

Kiam mia amikino Elda verkis kaj aperigis en nia ŝatata bulteno tre ĉarman artikolon ĉirkaŭ miaj limerikoj, mi trovis tie unu mistajpon. Nome, pri la 5a SES… Nu, perdiĝis tie unu unuo – la ĉijara SES estis jam la 15a! Tio jam estas eta (duon)ronda jubileo, ĉu ne? Bonvolu do konatiĝi kun tiu ĉi populara somera aranĝo.

La unua emblemo de la aranĝo	*La emblemo de la aranĝo ekde la jaro 2019*

Somera Esperanto-Studado estas la plej granda internacia E-renkontiĝo celanta lernadon de Esperanto internacinivele, destinita por ĉiuj, kiuj volas eklerni aŭ plibonigi sian Esperanton.

La unua lernado okazis en julio 2007 en la hotelo *ESPERANTO* en vilaĝeto Pribylina sub la nomo **Slava Esperanto-Studado**. Jam en la sekva jaro la nomo de la aranĝo ŝanĝiĝis al la ĝisnuna **Somera Esperanto-Studado** kaj la renkontiĝo ekfunkciis kiel la unua eksterreta renkontiĝo de la uzantoj kaj la kreantoj de *lernu!*. Ĝi okazis en Modra-Harmónia. Ekde tiam la aranĝo trovis lokon en diversaj urb(et)oj de Slovakio, kaj ĝia **partoprenantaro** ĉiujare kreskis – el la 50 partoprenintoj dum la unua SES ĝis la 258 partoprenintoj en la jaro 2018. SES kutime **daŭris** inter sep ĝis naŭ tagoj.

La oficiala paĝaro de SES estas https://ses.ikso.net/, kaj tute sube vi trovos la arkivon, kie vi povas vidi la antaŭajn SES-ojn.

La antaŭtagmezo apartenas al la lernado je la niveloj A1-C2 gvidata de larĝa gamo de internacia instruistaro. Jaron post jaro **aldoniĝadis** ankaŭ **aliaj** interesaj **programeroj**, kiel kursoj pri **Esperantaj literaturo kaj kulturo**, pri **historio de Esperanto**, pri **tradukado de kaj al Esperanto,** la seminario por instruemuloj sub la nomo **Flugiloj de Malfacila Vento**, parolaj kaj skribaj **ekzamenoj laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro** (KER), **Somera Esperanto-Programado** (SEP).



En la klaso. La instruisto estas videbla fone en la spegulo!

Post la antaŭtagmeza lernado okazas **posttagmeze** prelegoj, kursetoj kaj metiejoj, lernado de kantoj, danc-kursoj, riĉa sporta programo.

Vespere okazas kulturaj kaj distraj programeroj: koncertoj, teatraĵoj, Nacia (kun popolmuziko kaj vingustumado de la slovakaj vinoj) kaj Internacia (al kiu kontribuas la ĉeestantoj mem) Vesperoj. Kutima ero de la aranĝo fariĝis ankaŭ la Internacia kuirarta festivalo.

Kaj kiu eltenas ĝis la malfrunoktaj (aŭ frumatenaj) horoj, teumas en la Gufujo aŭ dibocas en la dancejo. Zlatko Tišljar foje konstatis surprizita: *„Preskaŭ ĝis mateno oni kantas, dancas kaj*

trinkas, sed je la naŭa horo ĉiuj jam sidas en siaj klasoj."

Dum la semajno okazas ankaŭ kelkaj duontagaj **ekskursoj** kaj merkredo kutime estas la ripoza tago, dum kiu la interesiĝantoj povas partopreni la tuttagan ekskurson.

En la jaro 2014 la unuan fojon SES paralele okazis ankaŭ en **Rusujo**. La dua eksterslovakuja SES estis por la jaro 2020 planita en la Ĉeĥa Respubliko. Pro la kronvirusa pandemio la organizantoj ŝanĝis ĝin al **virtuala**. Same en la jaro 2021 SES okazis nur virtuale. La ĉefa instruado okazis dum la du semajnfinoj kun la aldona libervola programo inter ili.

Tamen ni ĉiuj kredas, ke en la jaro 2022 SES fine povos okazi ĉeeste en la Ĉeĥa Respubliko, en ĝia moravia urbeto Kroměříž *(legu: Kromjerĵiĵ)*, somera ĉefepiskopa sidejo, kiu pro sia kastelo kaj ĝardenoj estas enskribita en la liston de la monda kultura heredaĵo de Unesko. Ankaŭ vi tie estas elkore bonvena!

Fejfi (Magdaléna FEIFIČOVÁ) el Slovakujo, Žilina, 2021 11 20

El nia mondo!

Nordbaltaj Tagoj

Okazis tiel, kvazaŭ mi atendintus la raporton de la gugla mapo resumi miajn travivaĵojn en Norda Baltujo. Ĝi montras kvardek tri kilometrojn da piediro dum kvar tagoj.

Tallinn, Tartu kaj Helsinko

Kiel mi rakontu mian vojaĝon, ĉu kiel fabelon ĉar ĝi estis fabela, aŭ prefere kiel mozaikon de memoreroj? Tien kaj reen en tempo kiel ĉio venas al mi en la kapon.

Memoroj freŝaj kirliĝas kaj intermiksiĝas - fariĝas sentoj…

Trabrilas ĉion vizaĝo de mia filino al mi jam forte mankanta. Ni vizitis ŝian universitaton: EKA - Akademio de Artoj kaj Metioj. Ĝuste la tagon, kiam ni estis tie, metiejoj kaj lernoĉambroj estis plenaj de studentoj. Studentoj junaj kaj belaj, sur vizaĝoj estis trajtoj de alvokiĝo, trajtoj de estontaj artistoj, artmetistoj. Estonoj estontaj - por la vortludo! Ĉie okazis laboro diligenta, vigla kaj verva. Metioj estis ekipitaj moderne per metiiloj misteraj, okulplezurigaj. Pleniĝus la ĵurnalo se mi enlistigus la nomojn de la diversaj metioj. Teksarto mem havis metiejojn por ĉiuj specoj de teksaĵo kaj ĉiuj fazoj de teksado…

Estis jam la tria tago vespere, kiam ni sidis kune kun Ester (Pütsepp) kaj Chris (Christopher James Kerr) en iu portugala restoracieto, post longa promenado serĉinte iun ajn lokon kiu pretis nin gastigi sen kovidpasporto. Ili ambaŭ manĝis ian fiŝpastaĉon, mi kustardan pastaĉon, kukaĵon portugalan, kiam subite Ester turnis sin al mi:

- Ĉu vi scias István, ke ni estas parencoj?

Eklumis rideto vasta sur miaj vangoj.

- Jes, Ester, sed bonvolu ne ofendiĝi, vi estas la unua dum niaj tagoj en Tallinn kiu ekkonscias tion.

La leganto devas scii, ke mia unua frazo al la unua estono, kiun mi renkontis, sonis jam ekzakte tiel: mi estas hungaro, dirinte aŭ ne, sed certe implicinte la parencecon kaj post tio nature atendante sintenon kiu kutimas regi inter si en granda familio…

Kun Ester ni renkontiĝos venontsomere en Klaipeda: mi jam antaŭĝojas pri tio.

Chris komencos varbi subtenantojn por aprobi la proponojn esperantistajn al la Konferenco pri la Estonteco de Eŭropo. Li, kiel programisto, komprenas la virtualan spacon. Li estas nia espero ĉar se la epidemio longe daŭros ni ege bezonos spertulojn kiel Chris, ja reorganizi nian movadon efike ni povos nur en la virtuala spaco. Unuopa, sola esperantisto estas la plej malfeliĉa estaĵo sur la Tero.

Granda librovendejo ie en la centro de la historia urboparto:

- Ĉu vi havas hazarde esperantaĵon iun ajn? - mi enpaŝis ĝin suben tra la sojlo.

La vendisto sen embaraso per memkomprenebla paŝoj aliris al iu ŝranketo kun vitraj pordoj, malfermis serureton kaj fingromontris al deko da libroantikvaĵoj. Mi singarde eltiris libron: *Antologio de Estona Esperanto Literaturo*, eldonita en 1932! Oni havas esperantan libron de altvalora enhavo kaj gardas ĝin malantaŭ vitraĵo fermita per ŝlosilo. Bedaŭrinde mi ne povis permesi al mi aĉeti ĝin. Mi vidis ankaŭ gamon de libroj sur la rando de mia skribotablo, obstine atendante la legonton.

Mi komprenis ke nia lingvo kaj sankta afero estas profunde enradikiĝinta en Estonujo. Tio impresis min forte.

Sakristano Kalle Vilbaste en la Preĝejo de Sankta Spirito: mia filino tuj realigis al si ke li estas esperantisto. Ŝi simple diris al mi, ke li aspektas kiel esperantisto. Pri kialoj nenion ŝi diris. Cetere ekzistas aferoj sen kialoj, kaj mi lasis tiel. Sakristano Kalle estis tre simpatia. Antaŭ tridek jaroj li esperantiĝis. Domaĝo ke ni ne povis paroli plu, neniu parolas tiel bele kiel li. Tempo ne sufiĉis al ni por viziti lian etan klubon. Sekvontfoje, mi promesas nun.

Intertempe ni komencis ŝanĝi mesaĝojn kun Saliko, po du-tri en tago, animon kaj menson inspirantajn. Betuloj kuris laŭ la reloj de nia

trajno al Tartu, ĉiam pli kaj pli multe da betuloj fine formis nepenetreblan belan ĝangalon. Betuloj alternis je pinoj altaj, senbranĉe kalvaj, ruĝecaj supre kronitaj per verdaj kronoj.


La ĝangalo ruĝiĝis.

Nia pramo transflosis la Finnan golfon senŝancele, granda ŝipo kun naŭ ferdekoj… Ondoj Baltaj indulgis nin.

Raita Pyhälä, je movada nomo Saliko, atendis nin en la akceptejo de la hotelo kaj nia kuna aventuro komenciĝis. Ni jam konatiĝis pli frue kvankam ni ne vidis unu la alian.

Saliko, Ágnes, edzino mia kaj mi sidis ĉirkaŭ tableto en la kafejo *Kappeli* rigardante al Esplanade Park, kie la kafejo troviĝas. La parko en sia tuta beleco, la vasteco de la vitra verando kaj la eminenta staturo de la konstruaĵo kreis perfektajn stilon kaj atmosferon.

Saliko demandis, ĉu mi konas la nomon de la bero sur ŝia kukaĵo, kaj ŝi kontente konstatis ke mi nomis ĝin ĝuste *mirtelo*. Poste ni kune konstatis per la ekzemplo de vakcinio kaj vakcino, kiom grandan diferencon donas nur unu „i”.



Mi forgesis demandi Salikon, ĉu ŝi hazarde legis la hungaran draman poemon „La Tragedio de l’ Homo” de Imre Madách tradukita de Kolomano Kalocsay, en kies sepa bildo tiu ĉi unu litero „i” ludas terure frenezan rolon....

- *István, vi estas filatelisto, ĉu ne?*- diris Saliko kaj eltiris el sia saketo du kovertojn. - *Mi heredigas ĉi tiujn al vi.*

Sur la tablo kuŝis relikvoj – mi preskaŭ perdis spiradon. Letero de William Auld al Raita Pyhälä, aprobanta kaj instiganta ŝin plu verki. La alia letero estis kristnaskaj bondeziroj al ŝi de Marjorie Boulton. Ruĝgorĝulo sidas sur ileksobranĉo sur la poŝtkarto ricevita.

- *Saliko, ĉu vi estas preta por sendi ankaŭ al mi la „Paganan kontempladon”, ŝatitan de William Auld ?*

Nia promenado estis poste trempita de persista pluvo sen grandaj gutoj.

La hotelĉambro estis tiel malgranda ke ni apenaŭ povis ĉirkaŭiri la duoblan liton kaj pendigi mantelojn ie ajn por sekigi ilin.

Post naŭ horoj da dormo terura spasmo en dorso vekis min. Mi eĉ ne memoras la lastan fojon, kiam mi tiel daŭre kaj multe dormis. Mi sentis min punita pro tio.

Helsinko vekiĝis je sunbrila mateno, kaj en rekta, streĉa pozo, mi vizitis la ĉefajn vidindaĵojn kun mia edzino, pliigante la nombron de kilometroj, kiujn ni plenumis. Ankaŭ en Helsinko ni piediris ĉien.

Posttagmeze Saliko akompanis nin al niaj gastigantoj. Nebulo kribris kaj densiĝis dum nia vojo. Ágnes fotis diligente kaj prenis foton pri mi kaj Saliko ĉe la statuo „Patrina amo estas la plej granda”. Ritva (Sabelli), Kristiina (Hautamäki) kaj Sakari (Kauppinen) atendis nin en sia hejmo kun teo, kukaĵoj kaj fruktoj; Saliko bakis por ni bongustan pastorulaĵon.

Mi rakontis, ke miaj geavoj naskiĝis kaj vivis sian tutan vivon en vilaĝo nomita Tapio, la dio de arbaroj en la finnaj legendoj. Mi jam sciis pri tio en mia infana aĝo, ĉar mia patro fiere rakontis al mi pri tio. Sed nun mi aldonas, ke Tapio havas barbon el likeno kaj brovojn el musko kaj lia edzino estas Mielikki kiu devas esti belegulino.

Mi salutis niajn gastigantojn en la nomo de la nova prezidantaro de HEA (Hungara E-Asocio) kaj transdonis nian librodonacon titolitan *Steloj de Eger,* historian romanon pri okazintaĵoj dum la okupo de Hungarujo de la Otomana Imperio.

Mi parolis pri la kernelementoj de nia programo. Esperanto por Hungarujo gravas pro siaj propedeŭtikaj ecoj kiel multlingva akcelilo de lernado de fremdaj lingvoj en iu ajn aĝo. La alia eco estas tio ke pere de Esperanto oni povas efike kontribui al la disvolviĝo de kapabloj de lernantoj de la tria kaj kvara klasoj en bazaj lernejoj. Kreado, taksado, analizo, apliko kaj kompreno – en ĉi tiuj aferoj oni povas plibonigi, laŭvice kaj samtempe - la kapablojn de la lernantoj. Hungarujo ege be-zonas plibonigon de la lingvoscioj de sia loĝ-antaro kaj ege bezonas malgrandigi la nom-bron de lernantoj sen bona tekstokompreno en la decida kvina klaso.

Mi eksciis, ke similaj problemoj estas konataj ankaŭ en Finnlando.

Mi rakontis pri la kampanjo de eŭropaj esperantistoj rilate al la „Konferenco pri Estonteco de la Eŭropa Unio”. Enkadre de la kampanjo ni subtenas proponojn esperantistajn al la Konferenco kun la celo, ke la okcent civitanoj elektitaj el la civitanaro de la Unio pritraktu ilin pozitive kaj raportu pri tio korekte kaj plusendu ilin al la Eŭropa Parlamento kaj al la Eŭropa Komisiono.

Mi rakontis pri mia „sukceso” en la hotelo: kiel bone, la akceptejistino interesiĝis pri nia lingvo kaj mi deklamis al ŝi la komencon de Kalevala.

Mi ekemis deklami ĝin denove Esperante kaj deklamis ĝin hungare, kaj fine petis de Sakari tion fari finne, kaj la

„melodioj moduliĝis”.

Paĝo 6ª

Navigis al la Ĉiela Haveno Boris Di Costanzo!

Malfacilas trovi plej belajn kaj konvenajn vortojn por memorigi esperantiston, tian kia estis Boris. Preskaŭ 40 jaroj (NdR: li esperantistiĝis en 1984) pasis de nia unua renkontiĝo kaj en tiu ĉi longa periodo ni triestanoj havis la bonŝancon funde konatiĝi kun tiu vere eksterordinara persono. Li fariĝis strikta kunlaboranto kaj kunaganto de nia asocio; li estis aktivemulo havanta tiun specialan econ entuziasmigi eĉ la plej nedecidemajn, iniciatinto sekvanta ĉiam sian ĉefan celpunkton: kuntreni la plimulton de samideanoj. Danke al sia milda, ĝentila kaj afabla sinteno li estis aprezata de ĉiuj, sendistinge. Neniam trudema kaj nekredeble modesta. Li evitis la sinparadon, prefere staris duavice, eĉ se la realiĝo de io estis tute lia persona akiro.

Multe li laboradis dum sia vivo favore al esperanto kaj al la nacia kaj Rijeka-a E-asocioj. Nelacigebla, ĉiam ridetanta, li sukcesis aranĝi multajn naciajn kaj internaciajn kongresojn aŭ renkontiĝojn, al kies brila efektiviĝo li dediĉis ĉiujn siajn fortojn kaj komplete metis je dispono siajn elstarajn kapablojn.

Inter tiuj aranĝoj menciindas la TEJO-Kongreso, Alp-Adriaj Konferencoj, Eŭropa Kongreso kaj plie la sukcesaj kulturfestoj okaze de la 100ª kaj 110ª jariĝo de la Societo Rijeka (2007-2017), plie ĉiujaraj renkontiĝoj kun Triesta E-Asocio en Kaštelir, Istrio, okazintaj en la bieno de la neforgesebla Marĉelo Trampuh. Kompreneble li ankaŭ aktive helpis dum la Zagreba UK (2001). Ĉefdelegito de UEA en Kroatio dum multaj jaroj, Boris Di Costanzo ĉeestis 12 UK-jn kune kun aliaj Esperantistoj de sia urbo.

Post aliĝo en la Rijeka-Societo li eniris la estraron, en kiu li postenis ankaŭ kiel vicprezidanto kaj prezidanto. Dum multaj jaroj li aktivadis kune kun Vjekoslav Morankić, alia kolono de la Esperanto-movado en Kroatio.

Ne forgesindas, ke kune ili zorgis pri la *Esperanto-Domo*, respektive *Hostelo Esperanto*, en Kostrena. Tie li okazigis dum tuta jardeko la Esperantan deklamkonkurson por geknaboj. Ĉe la renovigado de tiu domo li laboris kiel masonisto, elektrikisto, tubriparisto, lignaĵisto k.c. Tia li estis: ĉie ajn kie oni bezonis helpon, li ĉeestis. Notindas, ke danke al la garantiaĵoj de la E-Societo Rijeka, pri kiuj li respondecis, la Kroata E-Ligo povis aĉeti sian nunan ejon en Zagrebo *(NdR: el notoj pri li de S. Štimec)*.

Alia tre grava afero li entreprenis kun sia amiko kaj samsocietano Vjekoslav: ambaŭ partoprenis en debato pri Esperanto en la Eŭropa Parlamento, Bruselo.

Krom Esperanto, li havis du kromajn ŝatokupojn: filatelon, ankaŭ priesperantan, kaj faradon de vino kaj brando, por si kaj siaj amikoj.

Kun li laste mi renkontiĝis por literatura vespero, je la 6ª de novembro 2021, en la Domo de la Itala Komunumo en Fiume-Rijeka, kies gastoj ni ĉiuj estis, danke al lia organizado kaj de Dr. sc. Ana Alebić-Juretić. Temo de la kunveno estis: *Per Esperanto trans la limoj*. *Dialekta poezio de Fiume kaj Triesto en esperanto*. Estis vere tre bela aranĝo, plene ĝuita de la ĉeestantaro. Parte kortuŝveka kaj parte distra. Post komuna babilado antaŭ taso da varma kafo, alvenis la forirmomento, sed ... surprizo, ja bela surprizo: fortepiana koncerto de ital-fiumana junulo. Li ludis klasikajn kaj modernajn pecojn, kaj, fine, eĉ muzikaĵojn el popola tradicio, kies dialektaj tekstoj estas preskaŭ komunaj al Fiume kaj Triesto.

Aparte specialan momenton mi travivis, kiam Boris, kun eleganta gesto, invitis min danci: tio okazis unuafoje de kiam ni ekkonis unu la alian! Ĉu hazardo...?

Antaŭ ol eliri la palacon, ni disiĝis post varma brakumado, kaj... *ĝis la revido, iam ajn!*

Jes, iam ajn! Vi ne plu estas inter ni sed vi nestos porĉiame en niaj koroj. Ĝis la revido, mia kara Boris, ĝis la revido!

Via amikino Elda



Bors kaj Elda - "Internacia Kiso" - Kie estas la edzino de Boris?



Je mia granda honoro miaj gastigantoj donacis al mi *Kalevala*-n belege binditan.

Mia edzino prenis kelkajn fotojn ĉe niaj gastigantoj kaj multajn en Helsinko.

Mi forgesos nenion pri mia unua vojaĝo kiel prezidanto de HEA, kiu kondukis min feliĉe al niaj „parencoj”.

Mi tre dankas al Sinjoro Ahto Siimson ĉefdelegito, estrarano de la Estona Esperanto-Ligo kaj al Sinjorino Tiina Oittinen, sekretario de E-to Asocio de Finnlando pro la organizado de miaj renkontiĝoj.

Mi forveturis al Norda Baltujo kaj mi alvenis al Esperantujo!

Verkis István SZABOLCS,
prezidanto de Hungara Esperanto-Asocio



Sendis Luis Rafael Berrios Macario <luisrafael.berrios@nauta.cu> el Kubo.



Radiaj regionaj programoj

Merkredo 19ª januaro	14.50 – 15.00 Esperanta Literaturo
Vendredo 11ª februaro	14.50 – 15.00 Naŭ minutoj kun...
Vendredo 11ª marto	14.50 – 15.00 Esperanto kaj la Internaciaj organizaĵoj

Novjara Rubriko



La Grilo Klaĉanta

★Flue mi parolas la italan; okaze de bezono ankaŭ la anglan kaj francan lingvojn; foje, dum dormo, la rusan kaj, kiam mi drinketas, eĉ iom da Esperanto!

★Laboro nobligas la homon, sed neniu ĝis nun mortis pro ripozado!

Fonto: Kalendaro de Frato Divenisto
www.frateindovino.eu

Pacan k Sanan 2022ª Jaron
al la TEA-anoj kaj Gelegantoj



deziras Triesta Esperanto-Asocio!